# Trejnilo de Esperanta Leksiko

Kompilo kaj metodika prilaboro: Ryszard Rokicki

## TESTO 9

**Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

1. ˽ l ˽ m ˽ ne sentas, papero silentas.
2. Gardu kandelon por la ˽ ˽ k ˽ ˽.
3. Kiu panon donas, ˽ ˽ l ˽ ˽ t ˽ ˽ ne konas.
4. Senplumigi kokinon, ne v˽ k ˽ ˽ t ˽ mastrinon.
5. Li ˽ ˽ l ˽ t ˽ ˽ profunde kaj mordas hunde.
6. Tia solvo – se solvo eblas – nepre devas esti ne nur j ˽ ˽ t ˽ sed ankaŭ humana kaj homarama.
7. Sed ni povas trovi valorajn citaĵojn kaj ˽ ˽ z ˽ ˽ ˽ l ˽ ˽ ˽ ankaŭ en la riĉa historio de nia propra lingvo.
8. Dum li ˽ ˽ ŝ ˽ ˽ sur klinika benko, flegistino fiksis plurajn konektilojn sur lian bruston.
9. Ŝtatlimo ŝajnas eble ne nur natura sed ankaŭ utila, ĉar ĝi difinas l ˽ n ˽ o ˽ aŭ starigas muron, kiu evitas interpopolan kvereladon.
10. Ekzistas nur kvin subteraj urbegoj, sur ˽ ˽v˽ ˽ s ˽ ˽ kontinentoj.

**Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

1. Fine de la fabelo la knabino kaj la lupo kune manĝis la kukojn kaj kune trinkis la vinon, kiujn la knabino portis al sia a ˽ ˽ n ˽.
2. Kiam ne plu estas ĉasaĵo, la homo bredas b ˽ s ˽ ˽ ˽ ˽ en rezervejoj por havi la plezuron pafi, kapti, fanfaroni.
3. Li eraris en bona d ˽ ˽ ˽ k ˽ ˽ kaj fakte atingis ĝustajn rezultojn.
4. Printempo semas, **a** ˽ ˽ ˽ **n** ˽ rikoltas.
5. Ĝis la m ˽ m ˽ n ˽ ˽ kiam mi skribas tiujn ĉi liniojn, nek UN-inspektoroj nek usonaj soldatoj trovis amasdetruajn armilojn.
6. Laŭ la b ˽ u ˽ maro inter verdaj insuloj navigas fabelaj ŝipoj de vikingoj.
7. Pri la programaro mi estis k ˽ ˽ t ˽ ˽ t ˽, sed mi spertis gravajn problemojn pri Interreto.
8. Hus estis k ˽ ˽ d ˽ ˽ i ˽ ˽ ekster la urbon, akompanate de granda homamaso, por esti brulmortigita.
9. Pri $\pi$, la instruistoj nur menciis, ke ĝi estas uzata por m ˽ ˽ ˽ r ˽ la areon de cirklo.
10. Por ne s ˽ ˽ t ˽ sur la seĝo pro malpacienco, mi eliris, fumis, trinkis iun aĉaĵon en apuda trinkkiosko, kaj revenis.

**Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

| |
|---|
| aper’, kolekt’, angul’, aŭskult’, paŝ’, lud’, plezur’, apart’, lig’, gazet’ |

1. La kvaropo liberiĝis, sed ne rajtas havi kontaktojn inter si, nek kun la ˽ ˽ z ˽ ˽ ˽ r ˽.

2. Emil eksentis, ke lia kareso ␣ ␣ ␣ z ␣ ␣ ␣ g ␣ ␣ ŝin kaj lante li brakumis ŝin.

3. Ĉirkaŭ tablo kun profesia skribisto ␣ ␣ ␣ ␣ k ␣ ␣ ĝ ␣ ␣ kozakoj, diktantaj la respondon por la sultano.

4. En marto de 2002 la usona registaro ␣ ␣ ␣ r ␣ g ␣ ␣ la jaran raporton pri homaj rajtoj.

5. La sekretario ␣ l ␣ ␣ ŝ ␣ ␣ kaj voĉlegis la akuzon, en kiu estis detale listigite, kion mi diris al la maljuna ruza fripono.

6. Zorgemaj patrinaj voĉoj vokis la infanojn jam la kvindekan fojon por vesti sin, kolekti la ␣ ␣ d ␣ l ␣ ␣ ␣ por hejmeniri.

7. Konato de mi trovis en sia dormĉambro sekretajn ␣ ŭ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ l ␣ ␣ ␣ de la ŝtatsekuro.

8. La aŭtoro duonĝuste asertas, ke la vizito de la ĉefministro al Yasukuni klare atencas la japanan konstitucion, kiu ␣ ␣ ␣ r ␣ ␣ g ␣ ␣ politikon kaj religion.

9. Por laboristoj telefono povas esti ŝnuro ␣ ␣ g ␣ ␣ t ␣ onin 24 horojn tage al laborejo.

10. Senzorge Marta kaj Aniko promenadis, amuziĝis, estis senlime feliĉaj, ke ili ripozis en tiu ĉi paradiza ␣ ␣ g ␣ ␣ ␣ t ␣ de la mondo.

**Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

1. Tre elokvente estas rakontita ___ el la periodo, kiam oni penis perforte asimili la bulgarajn turkojn.

a. naturo b. historio c. utilo d. momento

2. Se naskiĝus igvanidoj, por la posedantino tio estus eksterordinara travivaĵo, ĉar ___ en la mallibereco tiuj bestoj reproduktiĝas ege malofte.

a. sate b. plende c. kutime d. profunde

3. Japanoj pli kaj pli emas vivi for de ___ kaj do ne ŝatas krudaĵojn.

a. vagono b. naturo c. minuto d. somero

4. La konstruado de la kanalo kaj la ŝipliftoj ___ 32 jarojn (de 1885 al 1917).

a. akceptis b. festis c. esperis d. daŭris

5. Post certa tempo mi venis al la ___, ke plej utila estas la rekta helpo surloke.

a. gajno b. tempo c. ideo d. batalo

6. La klara, kvankam ne komplete triumfa venko de Silvio Berlusconi en la italaj elektoj ___ pluan paŝon en tiel nomata televidokratio.

a. markis b. tranĉis c. kuŝis d. zorgis

7. Irlando ne ___ alianciĝi kun Britio dum la dua mondmilito, kvankam multe da irlandanoj proponis sin kiel volontuloj en la brita armio kaj en tiuj de aliaj aliancaj nacioj.

a. mezuris b. pardonis c. konsentis d. suferis

8. Ili ___, ke ankaŭ eĉ la plej harstarigaj mistifikoj neniel povos plimalbonigi lian staton.

a. saltis b. komercis c. opiniis d. elektis

9. En Finnlando Roerich pentris pejzaĝojn de severa Nordo kun ĝia ___ beleco.

a. netuŝita b. laca c. fremda d. dika

10. La ___ varmo de la tero ne havas influon sur ĝian supraĵon kaj la vivo sur ĝi dependas sole de la suno.

a. malgaja b. verda c. atenta d. interna